



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 2. 1973	ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO CEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH	3-a periodo 39 a (44-a) jaro Monata
-----------------	--	---

La 43a Norvega Esperanto-Kongreso

Kunvoko

Per ĉi tio ni kunvokas la 43an landan kongreson de Norvega Esperantista Ligo en hotelo "La Mer", Haugesund, la 2.-3. de Junio 1973. La unua laborkunsido komencigos la 2an de Junio je la 11.00.

Tagordo:

1. Malfermo per la prezidanto.
2. Elekto de kunvenaj funkciuloj (protokolantoj, kunvena prezidanto, elekta komisiono, komisiono por plenrajtoj kaj viconombrado).
3. Jarraportoj 1971 kaj 1972.
4. Jarkalkuloj 1971 kaj 1972.
5. Alvenintaj proponoj (plialtigo de kotizoj, rezolucioj).
6. Varbado de kursanoj.
7. Ĉu denove dungi eksterlandajn kursgvidantojn?
8. Edukado de norvegaj kursgvidantoj.
9. Membrigo kaj konservado de novuloj.
10. Elekto de Liga Konsilantaro, inkluzive de Estraro, anstataŭantoj kaj revizoroj.
11. Eventualaĵoj.

Jarraporto kaj jarkalkuloj pri 1972 trovigas aliloke en ĉi tiu numero.

Pri la punktoj 3 kaj 4. Ĉar ne okazis landa kunveno en 1972, la jarraporto kaj jarkalkuloj pri 1971 ne estas traktitaj kaj aprobitaj de landa kunveno. La raportoj kaj kalkuloj pri 1971 kaj 1972 estas egale redaktitaj. La Estraro

proponas legi nur tiujn pri 1972 dum la ĉi-jara kunveno, sed petas la membrojn tralegi antaŭe tiujn pri 1971 en Norvega Esperantisto 2 kaj 3/1972, tiel ke oni povu ambau jarojn kune pritrakti.

Pri punkto 5. Pro la grave altigitaj afŝranko, preskostoj kaj generale ĉiuj prezoj la Estraro trovas necese proponi jenajn plialtigojn de la kotizoj: klubanoj ordinaraĵ al kr. 25, fam. kr. 8, jun. kr. 8, jun. fam. kr. 3; rektaj membroj ordinaraĵ al kr. 30; subtenantaĵ membroj al kr. 45; dumvivaĵ membroj al kr. 300 kaj 150. - Oni antaŭvidas proponojn ankau pri unu aŭ pluraj rezolucioj.

Pri punkto 6. Ĉar evidente ekzistas latentaj intereso pri Esperanto, i. a. inter la junuloj, la Estraro deziras konkretan diskuton pri nia varbado kaj varbmetodoj.

Pri punkto 7. Iuj kluboj esprimis deziron pri eksterlanda kursgvidanto. La Estraro deziras diskuton pri la dezirindeco kaj ekonomia ebleco de tia arango nun.

Pri punkto 8. Kiam estas aktuale, ofte montrigas malfacile trovi lokan esperantiston, kiu estas preta kaj kapabla gvidi kurson. La Estraro deziras diskuti la eblecojn eduki membrojn kiel kursgvidantojn.

La Amazonia Aŭtovojo



La plej longa vojo en Sud-Ameriko estas 5000 kilometrojn longa. Ĝi iras kiel sulko tra la ĝangalo de Amazonio. Miloj da brazilanoj laboris dum multaj jaroj en la sufoka varmeĝo. Unue ili malfermis vojon per siaj "machetes" aŭ haktranĉiloj, kaj poste sekvis la buldozeroj kaj la fosmaŝinoj. La aŭtovojo de Recife al la perua marbordo estas unue la grandaj spitoj de la homo kontraŭ la naturo.

Malsledd skal ha endelsen -n: 5000 kilometrojn longa; ĝi pezas tri kilogramojn; li restis unu semajnon.

"La brazilanoj laboris multajn jarojn" kan, som man ser, også heto: "...dum multaj jaroj", og da naturligvis uten -n, for preposisjonen dum tar ikke endelsen -n.

Preposisjonen tra skal heller ikke vanligvis ha -n, "tra la ĝangalo". Men hvis det ikke fremgår klart av sammenhengen, at bevegelsen fortsetter videre enn til angjeldende ting, kan man benytte akkusativ. Zamenhof har imidlertid selv frarådet dette.

Preposisjonen da brukes ved kvantum, antall, mål, vekt: glaso da akvo, dudeko da ovo, unu gramo da oro. Da kan ikke brukes foran den bestemte artikkel, ikke foran eiendomspronomen, og ikke foran påpekende pronomen (altså foran la, mia, via osv., tiu).

Poste sekvis er et uttrykk man helst bør unngå, da det i begrepet sekvis allerede ligger at det skjer senere. Et slikt uttrykk heter pleonasme.

Andre eksempler: "Bilen rygget bakover" (en bil kan ikke rygge fremover!). "Han pleier vanligvis å stå tidlig opp." - enten: "Han står vanligvis tidlig opp" eller: "Han pleier å stå tidlig opp."

Ak III.

La Estraro admonas ĉiujn klubojn sendi reprezentantojn al la landa kongreso, kiu diskutos esencajn punktojn de nia agado, kaj esperas ke ankaŭ multaj rektaĵaj membroj partoprenos. Detala programo venos en cirkulero.

La Liga Estraro.

Pri punkto 9. Tro multaj kursanoj ne farigas membroj de niaj organizaĵoj kaj malaperas el la movado. La Estraro deziras diskuti kiel ligi la novulojn al la movado, kiel konvinki ilin pri la neceso de membreco.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato ankaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/4 paĝo kr. 150,—, 1/8 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—, 1/8 p. kr. 20,—.

La kontorfondado.

O. Hjertaas	kr.	15,50
Bj. Aandahl	"	75,00
C.S.B.	"	20,00
E. Gjessing	"	15,00
I. Dahl	"	50,00
S. Korstvedt	"	25,00
O. Børresen	"	18,60
H. Skavold	"	25,00
		<u>kr. 244,10</u>

Kampanjo Reisetser 1973.

Kr. Sivertsen	kr.	100,00
L. Sivertsen	"	100,00
A. Bjerke	"	100,00
K. Berge	"	100,00
E. Matland	"	100,00
J. Matland	"	100,00
S. Korstvedt	"	300,00
H. Danielsen	"	300,00
I. Dahl	"	100,00
O. Børresen	"	100,00
A. Refsing	"	100,00
		<u>kr. 1500,00</u>

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

Membroj subtenantaj.

E. Gjessing
E. Matland
J. Matland
A. Anjer
L. Anjer
E. Skaret
J. Berggreen
I. Skavden
R. Bentsen
A. Pedersen
A. Refsing.

ESPERANTO EN "FAMILIEBOKA"

La tre populara verko "Familieboka" nun aperas en tute nova eldono, moderna, plaĉa, bela.

La dua volumo ĵus aperis, kaj ties antaŭlasta artikolo temas pri Esperanto.

Ĝi estas dupaĝa kaj ilustrita per la portreto de D-ro Zamenhof. La artikolo, kiun verkis D-ro C. Støp-Bowitz, koncize prezentas la plej gravajn sciindaĵojn pri la Internacia Lingvo.

ESPERANTO EN "SPEIDEREN"

La revuo de la norvegaj skoltoknaboj mallonge informas: "70 deltagere på landsleiren valgte esperanto som tema for speideraktivitetene og mange bestillinger innløp på lærebøker, særlig på den nye læreboken om esperanto for speidere "Jamborea lingvo" med tilhørende gramfonplate."

Nia demando: Ĉu niaj membroj atentis pri tio?

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

JARRAPORTO 1972.

ESTRADO.

La Liga Konsilantaro dum la tuta jaro konsistis el:

Prezidanto: C. Støp-Bowitz
 Vicprezidanto: Kjell Gustavsen
 Generala sekr.: John Berggreen
 Sekretario: Signe Korstvedt
 Kasisto: Karl Ekhaugen
 Estraranoj: Olav Rygg, Kirsten Ek
 Anstatauntoj: Hårda Danielsen, Otto Prytz, Nils Chr. Stenseth.

Ceteraj konsilantaranoj:
 Lars Kåre Hunnes, Trondhejmo
 Steffen Kjetland, Haugesund
 Per Johan Krogstie, Løten
 Elna Matland, Sauda
 Herolv Olsen, Tromsø.
 Revizoroj: John Selbekk, Aslaug Refsing.

Landa kongreso ne okazis dum 1972.

ADMINISTRADO.

Estrarkunvenoj. Okazis 7 estrarkunvenoj (7 en 1971), kaj oni protokolis 70 punktojn (86 en 1971).

Cirkuleroj. La Estraro elsendis al la kluboj kaj distriktoj 4 cirkulerojn, i. a. kun invito al mendo de donac-kaj propagandabonoj al Norvega Esperantisto, kaj pri „Agado Libroj”. Cetero oni publikigis informojn al la membraro en la rubriko „Sciigoj de N.E.L.” en Norvega Esperantisto. 2 el la cirkuleroj estis sendataj ankaŭ al la rektaj membroj.

Oficejo. La tenado de la oficejo en General Birchsgt. 30 estas ebla nur per la malavara subtenado flanke de la membroj per la oficeja fondaĵo (kontorfondaĵo). Pluraj pagas libervolan monatan kontribuon. La oficejo servas samtempe por Eldonejo Esperanto A/S kaj por Klubo Esperantista en Oslo, kiuj pagas parton de la luprezio. En la malnova oficejo en N. Slottsgt. 3 oni komencis kolekti la bibliotekon. La oficejon estris precipe la prezidanto. Estis regula deĵoro tie dufoje semajne. La laboron dividis inter si la estraranoj. La Ligo, la Eldonejo kaj la Klubo havas komunan telefonon.

La Oficeja Fondaĵo dum la jaro donace ricevis kr. 2114,00 (en 1971 kr. 1709,75). La Estraro kore dankas al la kontribuintoj.

La Financa Komisiono, konsistanta el Kirsten Ek (prezidanto), Johan Matland, Alfred Skyberg (membroj) ankaŭ dum 1972 ne laboris.

Kampanjo Rejsater. Ĝis la fino de 1972 16 personoj donacis kr. 1800 (unu persono pagis tuj por 3 jaroj).

Kunlaboro kun N.E.F.A. Daŭre bone funkcias la interkonsento kun Norvega Esperantista Fervojista Asocio. Ĝi disponas unu pagon en Norvega Esperantisto kiel sian oficialan organon, ĉiuj membroj de N.E.F.A. estas abonantoj de Norvega Esperantisto, kaj la kaso de N.E.F.A. pagas kr. 500,00 kiel kontribuon al la preskostoj.

DISTRIKTOJ, KLUBOJ kaj MEMBROJ.

Distriktoj. Precipe Okcidenta Distrikto bone laboris, Orienta, Meza kaj Nordlanda Distriktoj estis malpli aktivaj. - Nord-Norvega Esperanto-Distrikto ne funkcias.

Kluboj. Je la jarfino 1971 N.E.L. havis 17 aligintajn klubojn. Unu nova klubo fondigis, neniu malaperis. Je la jarfino 1972 N.E.L. sekve havis 18 klubojn.

Membrostatistiko:

Bergen, La Esperantoklubo de, Ok. D.	24
Bodø Esperantoklubb, N. D.	12
Bryne, Jæren, La Vanelo, Ok. D.	9
Gjøvik, Klubo Esperantista de, Or. D.	5
Halden, Ascendo, Or. D.	9
Hamar, La Norda Stelo, Or. D.	12
Harstad, Noktomeza Suno, N.-N. E.-D.	5
Haugesund, Mara Vento, Ok. D.	49
Jørpeland, Pacaj Batalantoj, Ok. D.	6
Kristiansands Esperantoklubb	15
Løten, La tri verdaj steloj de, Or. D.	11
Mo, La Esperantoklubo de, N. D.	5
Odda, La Glaciario, Ok. D.	5
Oslo, Klubo Esperantista en, Or. D.	144
Sarpsborg, La Urso, Or. D.	15
Sauda Esperantoklubb, Ok. D.	14
Tromsø, La Norda Lumo, N.-N. E.-D.	7
Trondhejmo, Grupo Esperantista, M. D.	28
Sumo:	375
Individuaj membroj	129
Entute:	504

La mallongigoj post la nomoj de la kluboj montras la distrikton, al kiu la klubo apartenas.

Specifo de la membraro laŭ kategorioj:	laŭ ka-	Transp.:	375
Klubanoj:		Individuaj membroj:	
Ordinaraj	263	Rektaj membroj ordinaraĵ	98
Junulaj	28	Rektaj membroj junulaj ..	5
Familiaj	56	Rektaj membroj familiaj .	5
Junaj familiaj	11	Dumvivaj membroj	13
Honoraĵ	3	Subtenantaĵ membroj	8
Dumvivaj	2	Entute:	504
Subtenantaĵ	12	klubanoj (Oslo) aligintaj	
— 375		dum la 4a jarkvarono, ne	
		pagintaj kotizon por 1972	2
			506

Krome pagis 1 kontribua membro. - Entute la membronombro montras kreskon de 2 membroj, t. e. 0,4 % kompare kun la antaŭa jaro.

KLUBLABORO.

Superrigardo. (Ĉar nur 17 el la 18 kluboj ĝis nun sendis ĉiujn devigajn raportojn, kelkaj el la subaj ciferoj eble estas tro malaltaj.) Suma membronombro je la 1/1 1972: 368. Aligoj: 38, eksigoj: 32. Membronomoro je la 31/12: 374. - Okazis 120 klubkurvenoj, meznombro ceestis proks. 55%. Raportigis 32 estrarkunvenoj, 12 festoj, ekskursoj k.t.p.. En 3 kluboj laboris 3 studrondoj kun proks. 20 membroj. 7 kluboj raportas pri biblioteko kun 628 volumoj. 69 klubanoj posedas elementan ekzamenon, 50 superan, 4 instruistan.

La kluboj grandparte kontentige raportadis, sed la estraro ankaŭ zorgo urgigis pri mankantaj raportoj. - La intereso inter la membroj grandparte saĝnas esti bona.

Teatra Sekcio, gvidata de C. Støp-Bowitz, sendis distraĵojn al kluboj, kiuj petis pri tio.

STUDLABORO.

Kursgvidantoj. Neniu eksterlanda kursgvidanto agadis en la lando dum 1972, sed en kelkaj lokoj okazis kursoj gvidataj de lokaj fortoj.

Kursoj. Raportigis 12 kursoj por komencantoj kun sume 78 kursanoj en Bryne, Haugesund, Kristiansand, Løten, Oslo, Sauda, Skien, Stavanger, Tønsberg, kaj 4 kursoj por progresantoj kun 24 kursanoj en Oslo kaj Tønsberg. Kredeble okazis ankaŭ kelkaj kursoj, pri kiuj raportoj ne estas ricevataj, aŭ kiuj je la jarfino ankoraŭ ne finigis.

Korespondaj kursoj. La Sekcio pri Koresponda Instruado estis gvidata de Else-Margrethe Müller, Trondhejmo. Estis bona kunlaboro kun „Folkets Brevskole”, kiu uzas la kursojn de N.E.L., sed mem prizorgas administradon kaj anoncadon. N.E.L. havigas instruiston kaj ricevas raportojn pri lernantoj, kiuj plenumas la kursojn de „Folkets Brevskole”. Ankaŭ Norvega Blindul Asocio utiligas la kursojn. - Ĉe N.E.L. aliĝis al la unua parto 44 kursanoj, al la dua parto 30. Oni daŭre liveris la kursojn por reduktita tarifo al gejunuloj; 1 lernanto en la unua kaj 1 en la dua parto estis tiaj. Ĉe „Folkets Brevskole” aliĝis al la unua parto 5 kursanoj, al la dua 2. - 1 kursano estas varbita de membro de N.E.L. Ĉiuj, kiuj plenumis la unuan parton, kaj ne jam estis membroj, ricevis duonjaran abonon al Norvega Esperantisto kaj proponon pri membreco. - Instruis Erling Holten kaj L. K. Hønnes, por gejunuloj Ludvig Anjer, por „Folkets Brevskole” L. K. Hønnes. - La provizo de la kursleteroj de la unua parto estas parte elcerpita, oni devis denove multobligi 3 el la leteroj. Tial la kurso ne estis anoncata kiel kutime en semajna gazeto. La reviziita unua parto estas en preso. Oni bindos ĝin kiel libron kaj bindos ankaŭ la duan parton. Ambaŭ estos uzataj ankaŭ kiel ordinaj lernolibroj.

Gazeta kurso aperis en 1972 en neniu gazeto.

Perfektiga studado. La Ekzamena Komisiono ankaŭ en 1972 korektadis taskojn por interesigantoj. Oni aparte klopodas igi la membrojn studi por ekzameno.

Ekzamenoj. Ordinaj ekzamenoj okazis en Junio en Oslo. 2 kandidatoj plenumis la elementan ekzamenon, 1 la instruistan. La Ekzamena Komisiono konsistas el: C. Støp-Bowitz (prez.), Olav Rygg (sekr.), Eva Støp-Bowitz (kas.), Otto Prytz kaj Einar Gustavsen (membroj). Ekzistas 5 lokaj ekzamenaj komitatoj, nome en Bergen, Haugesund, Sauda, Trondhejmo, Østfold, kaj 7 ekzamenaj delegitoj ekster la komitatoj.

INFORMADO.

Informa Fakoj (komisiito pri Informado: Ludvig Anjer). La komisiito dedicas specialan atenton al la arango „Semajno de Internacia Amik-eco”, kaj kontribuis per havigo de materialo al la stando en la foiro „Ferie-Fritid-72” en Oslo kaj per raportado pri la arango al la Esperanta gazetararo, radiostacioj k.t.p..

La Propaganda Fondajo ricevis donacojn de kr. 1160,00. Bankinter-gezoj estis kr. 506,38. El la fondajo oni uzis kr. 984,80. La fondajo posedis je la jarfino kr. 10 103,38.

„Esperanto-nytt”. Ankaŭ en 1972 la komisiito pri informado ne aperigis tiun informbultenon.

Informbroŝuroj. Okaze de la Esperanto-stando en la foiro „Ferie-Fritid-72” en Oslo oni represis la brosuron „Det internasjonale språket - Esperanto” en 10 000 ekzempleroj, plus pliaj 10 000 por ordinara bezono, kaj samtempe oni pretigis novan brosuron „La Internacia Lingvo”, en 10 000 ekzempleroj. Disdonigis po 3500, kaj restas 18 000 de la unua, 6500 de la dua, 3500 de la flugfolio. La faldfolio „Velkommen til Esperanto-bevegelsen” pro ekonomiaj kaŭzoj oni ankoraŭ ne represigis.

Gazetara Servo, gvidata de Elna Matland, elsendis al ĉiuj norvegaj ĵurnaloj 7 bultenojn kun sume 22 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj. Oni daŭre abonis eltondadojn per la firmao „Argus”. Oni registris 231 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo kaj 118 novaĵojn kaj 54 artikolojn, debataĵojn, referaĵojn el aliaj fontoj. Entute oni do registris 403 aperigojn (506 en 1971) en 99 gazetoj kaj revuoj (107 en 1971). Atakoj al Esperanto apenaŭ aperis.

Radio kaj televido (komisiito: Kirsten Ek). En programero pri „Komputoro kaj Socio” la intervjuato objektive menpisi Esperanton. En „Stavanger lokal” dufoje anoncigis kurso, kaj en „Vigra lokal” Hans Amund Rosbach parolis unu minuton pri sia lasta libro. Ĉe la malfermo de la skolta landa tendaro en Røros John Berggreen parolis proks. 5 minutojn per la loka stacio. Oni turnis sin al la „Radio-Konsilantaro” kun propono pri diskutprogramo pri internacia lingvo. - Propono al la televido havigi kaj sendi la TELEAC-kurson estis vana.

Interŝtataj organizaĵoj (komisiito: R. Bugge-Paulsen). Pri la skandinavia propono al UNESKO evidente daŭre laboras la svedoj. La Eŭropan lingvokampanjon gvidas d-ro Werner Egmann, kiu okupigis precipe pri enigo de apliko de Esperanto en la Eŭropan Komunan Merkaton. La komisiito daŭre planas revigligon de la kolektado de subskriboj i.a. inter parlamentanoj.

Blinduloj (komisiito: Otto Prytz). La senbenda eldono de Norvega Esperantisto, kiun prizorgis Kirsten Ek kaj Ludvig Anjer, havis 7 abonantojn, kaj Kluba Bulteno de Klubo Esperantista en Oslo estas daŭre surbendigata de John Berggreen por la blindaj membroj. La dua volumo de Erling Anker Haugen: „Esperanto-Norsk grunnordbok” estas en preso.

Skoltoj. La komisiito, Hans Amund Rosbach, sendis „La Skolta Mondo”n al la 3 norvegaj skoltasocioj. En la landa jamboreo en Røros arangigis ekspozicio. Oni laboras por oficialigo de Esperanto dum la monda jamboreo okazonta ĉe Lillehammer en 1975.

La Junulara Sekcio, gvidata de Nils Chr. Stenseth, ampleksas 45 membrojn, inter ili 17 junulaj membroj de Studenta Esperanto-Societo en Oslo. Pro foresto de la gvidanto en Usono dum la tuta jaro estis malmulte da aktiveco. Aperis nur la du lastaj numeroj 1971 de „Kvintinto”, la organo de Sveda Esperantista Junulara Unuigo, kiu estas organo ankaŭ de la norvega junulara sekcio. La Studenta Esperanto-Societo en Septembro arangis standon en la Universitato kun ekspozicio de libroj kaj disdonado de flugfolioj, kio rezultigis malgrandan kurson. La societo estas grupo de Klubo Esperantista en Oslo.

Faksekcio por Instruistoj, gvidata de Astrid Mansrud, estis tute pasiva.

Esperanto en la lernejoj (prez. de la Komisiono por Lerneja Kamp-ano: C. Støp-Bowitz). Oni daŭre atendas iniciatojn de norvegaj instruistoj kaj lektoroj esperantistaj por akiro de permeso por eksperimenta instruado de Esperanto en siaj lernejoj.

Informaj prelegoj. Raportigis 5 informaj prelegoj en Løten, Oslo, Skien, Tønsberg, kun proks. 130 aŭskultintoj.

Ekspozicioj. Dum la landa skolta jamboreo en Røros estis malgranda, sed efika ekspozicio. En la foiro „Ferie-Fritid-72” en Oslo en Aprilo N.E.L. kune kun Klubo Esperantista en Oslo (iniciatinto), N.E.F.A. kaj Studenta Esperanto-Societo arangis bone vizitatan standon, kie disdonigis entute proks. 10 000 reklamiloj; i. a. 14 personoj mendis korespondan kurson kaj 20 mendis lernolibron.

Kinej-reklamo. Ĝis la 30a de Aprilo la reklamato laŭ desegno de Johan Matland estis montrata en la kinejoj de Bergen kaj Bodø, kaj de la 25a de Aprilo ĝis la 31a de Decembro ankaŭ en Trondhejmo.

DIVERSAĴOJ.

Norvega Esperantisto. La redakcia komitato konsistis el Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg, kaj Hans Amund Rosbach, Kristiansund. La gazeto estis redaktata ĉefe laŭ la samaj principoj, kiel en 1971. La „Fervojistia Pago“ de N.E.F.A. en ĉiu numero, sub redakto de Odd Kolbrek, estis satata legaĵo ankaŭ de nefervojistoj. La kunlaboro kun la presejo, A. Sæther, Hamar, estis bona, sed la numeroj ofte estis liverataj kun konsiderinda malfruo, kaj aŭtune la presejo grave plialtigis la pres-prezon. La ekspedadon tre akurate prizorgis Randolph Grotmål. - Aperis 6 ordinaraĵoj 16-paĝaj, sume 96 pagoj (el kiuj unu pro miskompreno tute blanka). - Per sia „postmarka iniciato“ la ĉefredaktoro pli ol kovris la elspezojn de la redakcio.

„Pro Merito“. Ordna promocio ne okazis dum 1972.

Biblioteko. La pruntedoneblaj libroj daŭre staras en la oficejo de N.E.L., la ceteraj estas sekure magazenitaj. La kresko de la biblioteko rezultis ĉefe el recenz-ekzempleroj, kiujn ricevis Norvega Esperantisto, kaj gazetoj ricevataj intersange kun ĝi. Pruntedonigis nur 2 libroj.

La „Malŝlosilo“. Verkita de R. Bugge-Paulsen, fine aperis, per Eldonejo Esperanto A/S, aŭtune 1972.

Nordlanda kunlaboro. Nordlanda Esperanto-Komitato daŭre ne montris aktivecon. La Kunlabora Komisiono, konsistanta el la prezidantoj de la 4 landaj asocioj (dana, fiŝna, norvega kaj sveda) laboris precipe per korespondado kaj intersangaĵo de cirkuleroj; ĝi kunsidis en Västerås, diskutante precipe la daŭrigon de la subskribkampanjo.

„Reisetrafikkforeningen for Oslo og Omegn“. La kunlaboro kun tiu asocio estas bona. Pluraj kopioj de ĝiaj filmoj „Bonvenon al Oslo“ kaj „Oslo - la vikinga ĉefurbo“ kaj de la diapozitivaj kun akompana prelega teksto daŭre cirkuladas en la mondo. Oni daŭre distribuadis la turistbrosuron al petintoj en diversaj landoj.

Norvega ŝtata Fervojo. Ankaŭ ĝia filmo „Mi estis tie“ cirkuladas en la mondo, kaj oni helpis disvastigi ĝian brosuron kaj tiun de la Fervojmuzeo en Hamar.

Turisma Servo de N.E.L., sub gvidado de Kirsten Ek, peris informojn kaj aligojn por la norvegaj anoj de la kongreso en Portlando. - Aŭtune oni dissendis informojn pri la 58a Universala Kongreso de Esperanto en Beogrado.

Internacia organizo. La kunlaboro kun U.E.A. estis kontentiga. Ĉefdelegito por Norvegujo estas Alfred Skyberg, Komitatano A por N.E.L. estas Ludvig Anjer, C. Støp-Bowitz estas Komitatano B. En 1972 estis 62 Delegitoj en 20 lokoj en Norvegujo. La nombro de Individuaj Membroj de U.E.A. estis 95.

57a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Portlando. Partoprenis nur 4 norvegoj. La norvegan registaron kaj N.E.L.n reprezentis R. Bugge-Paulsen.

Prelegvojaĝoj ne okazis dum 1972.

Helpagado. Oni daŭrigas la kunlaboron precipe kun Mocambiko.

„Vivo de Zamenhof“. La transprenita stoko de la norvega eldono de Privat: „Vivo de Zamenhof“ estas disvendata por kr. 3,00, sed la disvendado okazas malrapide (en 1972 vendigis 48 ekzempleroj). La stoko estas nun pagita.

Semaĵno de Internacia Amikeco. Ankaŭ en 1972 la aranĝo vekis intereson inter la membroj en multaj lokoj.

Sliparo pri norvegaj esperantistoj. La sliparo ampleksas nun 10073 slipojn pri esperantistoj en 791 lokoj.

Koresponda statistiko. N.E.L. kun ĉiuj sekcioj dum la jaro ricevis 1160 leterojn kaj 953 presajojn kaj sendis 979 leterojn kaj 2698 presajojn.

La intereso pri Esperanto daŭre ŝajnas esti kreskanta, se ni juĝu laŭ la nombro da informetoj, kiujn ricevas la oficejo post ĉiu rimarkinda okazaĵo, gazetartikolo, intervjuo en revuo, ekspozicio, k.t.p.. Niaj respondoj ofte rezultigis mendon de lernolibro aŭ de koresponda kurso. Rimarkigas ankaŭ intereso pri starigo de kursoj en novaj lokoj, kie ne ekzistas kluboj.

Konkludo. 1972 denove montras etan kreskon de la membronombro, kiu bedaŭrinde estas danĝere malalta. Nia membraro konsistas ĉefe el maljunigantaj fideluloj. La perdo ne estas nenormale granda, sed la alfluo de novaj adeptoj estas tute malsufiĉa, kaj priplorinde multaj kluboj starigas kursojn. La kluboj devas grave reaktivigi tiurilate. Aliflanke espereble la vekiganta intereso en novaj lokoj povos almenaŭ kompensi la normalan perdon. Ni d e v a s esti pli multnombraj por povi akcepti kaj adekvate eluzi la favoron, kiu kiam ajn povos aperi ekz. en la lerneja kampo.

Oslo, la 31an de Decembro 1972.
la 22an de Februaro 1973.

C. Støp-Bowitz
John Berggreen

Karl Ekhaugen

Kjell Gustavsen
Signe Korstvedt

Olav Rygg

Kirsten Ek.

KALKULOJ 1972.

Sekcio pri Koresponda Instruado.
Kalkuloj por la jaro 1972.

Spezoj 1972.

Studmaterialoj kalkulitaj	996,00	Kurskotizoj	1660,75
Afranko	81,90	Rentumoj	231,26
Korektado	65,40		
Asekuro	25,00		
Profito, al la kapitalo	723,71		
	<u>1892,01</u>		<u>1892,01</u>

Bilanco je 31/12 1972.

En la kaso	6,19	Kapitalkonto je 1/1 1972	
Postgirokonto 100.33	4255,13		10777,75
Posta Sparkaso	2100,12	Profito	723,71
Forretningsbanken A/S	4348,89		11501,46
Studmaterialo	791,13		
	<u>11501,46</u>		<u>11501,46</u>

Årets balanse er satt opp etter ker er fremlagt og stemmer med kassadagbok med bilag, som er revidert. Postgirokonto og bankbø-

Trondheim, den 15. februar 1973
Erling Anker Haugen
revizoro.

Else-Margrethe Müller
kasistino.

JARKALKULO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO.

Spezoj 1972.

<u>Enspezoj:</u>	
Klubkotizoj	3287,00
Rektaj membroj	1755,00
Norvega Esperantisto, membro-abonoj	3900,00
Norvega Esperantisto, rektaj abonoj, anoncoj, kontribuo ..	2083,25
Rentumoj	163,82
Donacoj, lukontribuo	2714,00
El la kontorfondajo	332,40
El la kapitalo, deficino	459,86

<u>Elspezoj:</u>	
Kostoj	2116,34
Amortizo	210,00
Norvega Esperantisto	6535,20
Luado	3046,40
Afranko	1073,95
Gazetara Servo	1262,94
Kotizoj al U.E.A.	435,00
Kotizoj al distriktoj	15,50
	<u>14695,33</u> <u>14695,33</u>

Pro hazardaĵo kotizoj al distriktoj je sumo 158,00 ne estas inkluzivitaj en ĉi tiu kalkulo, sed aperos en la venontjara.

Bilanco je 31/12 1972.

<u>Aktivaĵoj:</u>	
En la kaso	335,54
Poŝtgirokonto 100.30	1524,47
Meblaro	2116,88
+ amortizo	<u>210,00</u> 1906,88
254 akcioj en Eldonejo Esperanto A/S ..	5588,00
5 akcioj en "Agado"	50,00
Debitoroj:	
Prop.fond. en Oslo Sparebank 10103,38	
Andresens Bank	5300,77
Div. debitoroj	<u>3537,76</u> 18941,91
<u>Pasivaĵoj:</u>	
Div. kreditoroj	7201,93
La kontorfondajo	1801,47
+ donacoj	<u>2114,00</u>
	3915,47
+ lupago	2446,40
"Esperanto-nytt"	1469,07
La Propaganda Fondajo	3465,76
	9421,80
+ rentumoj	506,38
+ enspezoj	<u>2706,20</u>
	12634,38
+ elspezoj	<u>2531,00</u> 10103,38
Konservataj klubkasoj	1059,00
Garantifondajo dumvivaj membroj	1846,00
Kapitalo	3661,52
+ deficino	<u>459,86</u> 3201,66
	<u>28346,80</u> <u>28346,80</u>

Oslo, la 31an de Decembro 1972
la 22an de Februaro 1973

Aslaug Refsing, John Selbekk
revizoroj.

Karl Ekhaugen
kasisto.

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO - NEFA

Kaldbakstubbén 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



LA RJUKANLINIO.
(Daŭrigo).

La ŝpuro estis same kiel tiu de la ŝtata Fervojo kaj la pezo 25 kg. po metro. La arkitekturo de la stacioj interakordiĝas harmonie kun la stiltradicio en ĉi tiu regiono. Iom post ion la fervojreto disvastiĝis, kaj en 1920 la Rjukanlinio ricevis interligon kun la ŝtata- kaj la eksterlanda fervojretoj. Ĝi havas sian propran historion kaj evoluadon kun impulsoj kaj de la ŝtataj kaj de la privataj kaj de la eksterlandaj fervojoj.

Ĝi estis la dua linio kiu elektrigiĝis - en 1911. Kaj tio fakte estis pionirlaboro. La elektraj lokomotivoj venis de Berlino.

En ĉi tiu regiono ofte ventegas

kaj okazis, ke pasaĝer- kaj varvagonoj pro tio renversiĝis sed nuntempe la linio estas ŝirmigita pere de digo, ŝtonmuroj kaj priplantaĵoj laŭ la speciale dangeŝaj distancoj.

La trafikentrepreno Rjukanbanen (La Rjukanlinio) trafikis ek de 1954 la fervojlinion Rjukan - Mæl - 16 km longa - kaj la boattrafikon Mæl - Linnoset, - 30 km longa distanco. Ĝi estas ano de R.I.V., sed ne de U.I.C., sed aplikas la regulojn de U.I.C. La boattrafiko okazas pere de tri boatoj. La kapacito de la plej nova kaj granda estas 21 ŝarĝ-fervoj-vagonoj, 800 tanoj da ŝarĝaĵo kaj 400 pasaĝeroj.



SVISAJ KAJ AŬSTRIAJ.

Inter la vendotaj poŝtmarkoj en la stoko de la redakcio troviĝas momente tre belaj svisaj kaj aŭstrijaj markoj.

Vi eble scias, ke ĝuste tiuj du landoj eldonas belegajn poŝtmarkojn. Ni ankaŭ havas multajn polajn kaj ĉeĥoslovakajn.



Diversaj Gojoj

Estis malvarme ekstere, kaj interne estis malvarme; sed dum la pensoj estas malhelaĵ, estas pli bone iri l sidi trankvile kun ili. Tial mi eliris. Mi tiel malĝojis. Mi pripensis la tempon, kiam mi nenion zorgon havis, kaj la multajn, multajn, kiuj dorlotis min per sia amo, sed kiuj nun forpasis tien, de kie ili neniam revenos, - ho, ĝis la plej lasta; mi pensis pri la tempo, kiam ĉio estis varma kaj hela; mi paŝis en lumplenaĵ salonoj, kaj varmaj koroj batis ĉirkaŭ mi; kaj nun! Malvarma kaj dezerta estas mia ĉambro, malvarmaj la homoj, malvarma la tuta mondo, kia la vintra tago, kiu kovris la urbon. Kaj mi pensis pri la sonĝo, kiun mi dumnokte havis: mi sonĝis, ke mia edzo estis reveninta, kaj aĉetinta grandezuron da brulaĵo al mi. Mi ne estis lin vidinta; li nur prizorgis la brulaĵon, kaj denove foriris. Estas tiel strange, sonĝoj iel igas onin reinfanigi, oni povas ĝoji pro la pli tragika kaj funebri pro nenio. Tiel mi en la sonĝo vere kortuŝiĝis pro tio, ke li estis aĉetinta brullignon al mi. Mi trovis en tiu simpla ago, al kiu mi mem sentas antipation, esprimon de ĉiu zorgo kaj amo kiujn li montris al mi ĉi sube, kaj kiun li, ho ve, certe ankoraŭ montrus, se tio estus ebla al la beatoj. La brulligno kostis ok markojn kiel en pasintaj tagoj, kaj sufiĉe strange miksiĝis la penso en la kortuŝecon, ke mi almenaŭ povus ekscii de li, kie oni povas aĉeti je tiu prezo. Kaj je ĉio ĉi tio mi pengis, dum mi iris tra la urbo kaj iris laŭ la ĝardeno de sinjorino Grüning al Piperviken.

Ĉe la angulo, precize je la komenco de la deklivo, staris almozpetulo; mi povis, jam longe antaŭ ol mi atingis al la loko, vidi, ke li sin prezentos tia. Mi do havis tempon aranĝi mian vizagon kaj surpreni la mienon decan al la preteriro de almozpetulo. Oni povus nomi la esprimon komunumvizaĝo. Devas esti stranga vizaĝo, sed neniu vere vidas ĝin, krom la almozpetuloj. "Donacu!" iu interna voĉo diras... "Ne donacu!" la komunumo instigas. "Donacu!" diras rememoraĵo el infanaj jaroj, kiam Patro kaj Patrino instruis, ke estas bela ago donaci, kaj vi legis la unuan rakonton pri tio en via nova bildlibro. "Donacu, donacu!" vokas la koro, "li eble havas kvar malsatajn infanojn hejme, li eble..."

"Stultaĵo", diras la sperto, "estas mallaborema hundo, kiu nenion emas fari," - "kaj kiun mi devas nutri", aldonas la komunumo krude. Kaj oni preterpasas kun sia komunumvizaĝo. Kaj jen mi preterpasis en miaj malgajaj revoj laŭ la deklivo al la Bankplaco. Dum mi atingis la supron, mi denove pensis pri la almozpetulo. Li estis petinta nur per siaj okuloj, ne antaŭmetis manon, kaj lia mieno estis nek aŭdaca nek seniluziiginta, dum li nenion ricevis, ĝi nur esprimis ian - mi povus diri gajan rezignacion, kvazaŭ li dirus: "Jen, kiel mi imagis."

Kaj mi denove enpensiĝis, kaj mi pripensis multon, inter alia ankaŭ la ĝojon; kaj jen mi havis la ideon: Estas tute strange, homoj ĉirkaŭ mi diras, ke jen tio estas ĝojo, kaj mi diras tio ĉi estas ĝojo, kaj jen ili deziras pruvi, ke tio, kio estas al ili ĝojo, ankaŭ estas ĝojo al mi, sed mi kontraŭe ne deziras pruvi al ili, ke mia ĝojo ankaŭ estas ĝojo al ili, mallonge - ni ne samopinias. Kaj nun mi volas deziri ion, ne decas deziri malgrandaĵon; se oni volas deziri, oni same bone povas deziri ion grandan, kaj nun mi volas deziri ion, kio ŝajnas al mi esti ĝojo, vera ĝojo, ĝojo el kiu oni povas havi plezuron. Mi kredas, ke estas la naturo de deziroj, ke oni rigardas supren. Estas kvazaŭ oni scias, ke ne multon oni povas esperi tie, kie oni paŝas.

Kaj tial mi rigardis supren, kiel mi kutimis, kiam mi estis eta; tiam mi ofte iris rigardante al la ĉielo, ĝis mi koliziis kun muroj aŭ traboj. Kaj jen! La sama sceno, kiun mi spertis, ripetiĝis tie supre. Jen mi estis la almozpetulo, kaj mi vidis Nian Sinjoron veni. Ĉe Li mi almozpetos, mi pensis, de Li oni povas peti ion grandan. Sed Nia Sinjoro preterpasis; li iris for, longdistanco for; li havis sian plej severan komunumvizaĝon. Ho, mi ne povis imagi ion alian, mi pensis, al li oni ne mensogas, li konas siajn homojn, kaj li scias, ke ni ne malenvias iun pro vera ĝojo. Se li donas ion, li donas pro pura kompato. Li kompatas nin. Ho, se li kompatus vin, reirus al vi kaj subite metus donacon en vian manon, dirante: "Jen por granda, vera ĝojo, por iu, kiu all vi estas ĝojo."

Kaj mi turniĝis kaj reiris kaj atingis al la loko, kie la almozpetulo staris. Li ne plu estas tie, sed ĉe malgranda komercobudo, laŭŝajne post finita aĉeto. Li traserĉis longtempe sian poŝon, sed per mieno, kiu esprimis tutcertan fidindecon. "Vere, ĝi estas tie," li diris, "mi ne havas kaj ne havis pli sur mian pekeman korpon hodiaŭ..." Kaj jen li trovis la moneron, kaj pagis. Mi aliris, kaj donis al li markon. Lia vizaĝo esprimis terurigon; li rigardis min, li rigardis la markon; fine li ŝajnis rememori min; li pripense klinis la kapon, kvazaŭ li cerbumus pri la kaŝita ligiteco inter li, la marko kaj mi. Mi demandis ĉu li havas edzinon kaj infanojn.

Ne, li ja ne havas. Li estis estinta kamentub-purigisto; sed ne povis elporti la aeron de la tuboj; lia kapo tiel turniĝis; sed nun li intencas fariĝi lignaĵisto, kiam li nur povas havigi materialojn. Li ja kolektadas monon al materialoj. Mi demandis, de kiam li kolektas monon al materialoj. Ho, jam dum tre longa tempo, post kiam li estis kamentuba purigisto, sed li ne povis elporti la aeron de la kamentuboj k. t. p. Poste li elprenis monujon, kiu ŝajne iam estis leda, enmetis la markon kaj fermis ĝin sekure. Ĉio okazis serioze, jes solene, kvazaŭ kiam oni enmetas la fondŝtonon al grandioza konstruaĵo. Mi diris al li kelkajn vortojn, kiujn la komunumo certe ne aprobus, kaj denove supreniris la deklivon profunde enpena. Mi preskaŭ estis forgesinta la grandan ĝojon, kiun mi volis deziri; nun mi unue elektu, kia ĝojo tio estu.

En la krepusko mi revenis kaj preterpasis la lokon. Proksimume tridek paŝojn antaŭe mi vidis figuron en la strato. Ĝi haltis je la mezo de la vojo, aŭ pli korekte, ĝi nek restis ĉe vojo nek mezo, sed moviĝis per strangaj kurbiĝoj de unu trotuaro al la alia, kiel kiam infanoj mkmovigas pendulon. Komence mi kredis, ke iu serĉadas ion; sed dum mi alproksimiĝis, mi vidis, ke estas la viro ĉe la deklivo, tiu, kiu kolektis materialojn. Kaj eĉ, li rekonis min; li salutis min per la plej feliĉa rideto. Jes, li vere estis vere ĝoja.

Tiam mi devis ridi, kaj per tiu rido malfermiĝis denove tiu profunda putu en mia animo, kiu tiel longe, longe estis barita, kaj jen, tie estis la vera ĝojo; en alia loko ĝi ne estas trovebla; kaj per mia tuta koro mi dankis Dion, kiu donis al mi tiun ĝojon, kaj ĝojplena mi hejmenvenis.

Korespondu

Ni tre volonte korespondus kun junaj geedzoj en via lando. Mi estas 33-jara oficisto. Ni interesiĝas pri turismo, geografio, naturo, kolektas bildkartojn, monerojn. Eŭgenia kaj Bogusław Przyborsky, Os. Gaj Bl. 28 m 8, TRZEBINIA-SIERSZA 3, woj. Kraków, Polujo.

15-jara knabo deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Marcelo Teixeira da Silva, Caixa postal 53, LAVRAS - 37.200, Minas Gerais, Brazilo.

19-jara junulo deziras korespondi pri diversaj temoj. Wiesław Mazurek, Izyce, 23-101 BYCHAWA, Pow. Bychawa, woj. Lublin, Polujo.

65-jara ĵurnalisto deziras korespondi pri muziko, literaturo, filmoj, vojaĝoj k.t.p. Henry Taylor F.R.C., Apartamento 6, 24 New Str., PAIGNTON-TORQUAY, S. Devon, TQ3-3HA, Anglujo.

Mi deziras korespondi pri infanpoezio, infangardenoj, muzik-edukado kaj aliaj temoj. Vladimir Choulgovsky, Bul. "9. Septemvri" 230 11, kv. Knajajevo, SOPIA 19, Bulgarujo.

18-jara knabo deziras korespondi kun gejunuloj el via lando. Intereso: i.a. politiko kaj Esperanto. Wolfgang Bohr, Michel-Reineke-Strasse 8, D-5568 DAUN/EIFEL, Germanujo.

24-jara oficistino deziras korespondi. Heidi Müller, DDR-50 ERFURT, Gartenstrasse 16, D.D.R.

Izola rusa malnova kaj maljuna esperantisto deziras korespondi. Kolektas bildkartojn pri pejzaĝoj, produktaĵoj de bildoj de famaj pentristoj, floroj. G. M. Dehterev, 612.700 OMTVINSK, Kirovskoj oblasti, Ul. Milicejskaja 35, U.S.S.R.

På Norsk

BRITISKE PARLAMENTSMEDLEMMER OM ESPERANTO.

100 parlamentsmedlemmer i England ble nylig forespurt om sin mening vedrørende internasjonalt språk. 45 svarte at de foretrakk Esperanto, 14 var enten imot dette, eller de mente at engelsk skulle være det internasjonale språket, 13 var ikke direkte imot Esperanto, og 28 visste ikke.

Blant dem som ønsket Esperanto som internasjonalt språk, var G. Thomson, den engelske ministeren som hadde spesielt med EF-affærene å gjøre. 8 av de spurte parlamentsmedlemmene hadde selv studert Esperanto.

ØST-TYSKLAND BRUKER ESPERANTO.

Den øst-tyske republikken har flere ganger tatt i bruk det internasjonale språket Esperanto med sikte på å skape interesse for republikken utenlands. Statsforlaget "Zeit im Bild" (Dresden) har gitt ut et flott tidsskrift med tittelen Junularo (Ungdom), hvor man i tekst og bilder viser den østtyske ungdommen, og samtidig gjør oppmerksom på den store ungdomsfestivalen som finner sted i Øst-Berlin i år.

Dana jarkongreso.

La dana jarkongreso okazos la 12-a kaj 13-a de majo en Århus kie samtempe (12-a - 18-a de majo) okazos jubilea kongreso da Internacia Fervojistia Esperanto-Federacio. La kongresanoj de CDEL partoprenos en la programode IEFEF i.a. en Interkona vespero, ekuмена diservo, Solena Malfermo, urba rondveturado kaj kongresa Baló. Informas: P.Jørgensen, Torden-skjoldsgd 2, Dk 8200 Århus N.

Sciigoj de N.E.L.

Norvega Esperantisto kaj la kotizo. Ĉiujare kelkaj membroj pagas sian kotizon tre malfrue en la jaro, ofte nur post pluraj urĝigoj. Tio estas grava malhelpo por ni. Tiu ĉi numero de la gazeto estas la lasta, kiun ni sendas al nepagintaj membroj, klubaj kaj rektaj. Kiam ni poste ricevos la kotizon, ni postsendos la numerojn, kiujn la koncerna membro ne ricevis, sed ĉar ja estas maloportune ricevi kelkajn malnovajn numerojn kune, estas konsilinde pagi la kotizon frue, kiel postulas la statuto. Tio ankaŭ ŝparas al ni multe da necesa ekstra laboro.

Taskotabelo por kluboj. - Aprilo: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas al N.E.L. kaj al la distrikto kotizon kaj liston pri la malfroĝintaj kaj eventualaj novaj membroj.

Majo: Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro diskutas la aŭtunan laboron kaj starigas planojn pri kursoj kaj aliaj aktivecoj dum la venonta aŭtuno.

La Liga Estraro.

Norvega Kroniko

Sauda

Jarkunveno 22.I.1973 ĉe ges Veka.

Unue la sekretario laŭlegis la jarraporton, poste la kasisto la jarkalkulaĵon. Ambaŭ aprobiĝis kun kelkaj rimarkoj al la jarraporto. Poste la elektoj donis jenan rezulton:

Prezidanto Elna Matland
Vic.prez. Norman Birkeli (nova)
Sekretario Arthur Bjerke
Kasisto Robert Rødsås
Estrarano Olga Overskei (nova)

Por la aliaj komisioj ni elektis la samajn kiuj deĵoris lastjare.

Venis cirkuleroj de N.E.L. pri venonta jarkunveno en Haugesund kaj pri aŭtobusa karavano al Beograd.

Post bongusta manĝaĵo regalita de nia dommastrino, ni transiris al literaturo: Johan Matland parolis pri traduko de norvegaj poemoj. Estas malfacile korekte traduki poemojn. Lihen tradukis multajn, i.a. de Welhaven, Wergeland kaj Wildenvey. De Wildenvey li trad. "Poemo al la maristaroj sur la altaro en la memorhalo en Stavern" Lia lasta traduko estas de Marie Lovise Widnes "Gangdøra" (vidu la antaŭan numeron de Norv. Esp.) Tiun li laŭlegis, poste ni kune kantis ĝin. Fine kotizenpago al N.E.L.

El la jarraporto ni i.a. lernis, ke Elna Matland pasintjare havis 20-horan esperantokurson por 10 el siaj lernantoj sur la 5a ŝtupo de la lernejo. Kelkaj el tiuj nun korespondas kun eksterlandanoj.

prez.: Lars Johansson, sekr.:
Olav Hage, kas.: Erling Killing-
bergtrø, estrarano: Olav Reier-
søl. Oni decidis komenci serion
da manuskriptoj kolektotan en la
Universitata Biblioteko kaj peti
al la Universitata Biblioteko
ellabori liston pri la literaturo
pri Esperanto kaj pri interling-
vistiko, kiu troviĝas en la bib-
lioteko.

C.S.-B.

Sarpsborg

La Urso kunvenas regule ĉium duan
merkredon. Aliĝis al la klubo
pluraj junuloj, kio kreas tute
novan atmosferon kaj multe da
vigleco en la kunvenoj. Ĉiuj kun-
venoj komenciĝas per tuthora in-
struado, kiu nun, pro la novuloj,
estas elementa, sed kuneroj ankaŭ
por la pli spertaj.

La urbo Sarpsborg asignis monon
al la kluba laboro laŭ rekomendo
de la komunuma kultura komitato,
kaj la ĝojo estis granda, kiam la
prezidanto povis, la unuan fojon,
transdoni ducent kronojn al la
kasistino.

Preskaŭ en ĉiu kunveno la klubo
aranĝas ion favore al la ekonomio
de Norvega Esperantisto.
Ni partoprenadas en la ŝakludo de
la redakcio, kaj ni amuziĝis per
la geografia ludo, kiu ankaŭ en-
spezigis belan sumeton.

La prezidanto kutimas legi novan
ĉapitron el la libro, kiun li nun
estas verkanta. Temas pri romano
kun titolo "Ordinaraĵ indianoj".

En la ĝenerala kunveno oni re-
elektis prezidanton J.H. Rosbach,
sekretarion Thure Resberg kaj la
kasistinon s-ino S. Birch Olsen.
Gimnaziano Trine Lise Bryn far-
iĝis nova vicprezidanto. Du aliaj
gimnazianoj, Olav Andre Manun kaj
Liv Skjeltorp estas nun estrar-
anoj.

Anstataŭantoj: Roald Birch Olsen
(reelekto) kaj gimnaziano Lisa
Schrøder. Revizoroj: Ragnar
Kjønigsen (reelekto) kaj gimna-
ziano Bengt Aarum.

Ref.

Oso

Klubkunveno 15.I.1973.

La prez. Annalise Rees bonvenigis
nin. Kari Kalsås, nia vojaĝgvid-
antino, preparolis la autobusan
karavanon al Beograd por UK.

Cirkulero de NEL pri propono de
Elna Matland: Kampanjo pri libroj
Peratju eĉ la plej modestaj kaj
timemaj povas efike kunhelpi.

"Satira komedio en la televido"
estis majstre ludata de: Bobby
Østmo, Randolf Gråtmol kaj Thor
Magnus Carlsen. Ĝi montris al ni
klare kaj precize, ke ni esperan-
tistoj ne rajtas "oficiale" ignori
la ekziston de Esperanto. Ni nepre
ne menciigu Esperanton malgraŭ ĉio
kaj ĉiu, sed ni ankaŭ nepre ne
evitu menciigi ĝin kiam ĝi evidente
devus esti menciita! La aktoroj
kaj la aŭtoro, John Berggreen,
estis varme aplauditaj.
Libroj vendiĝis por kr 111.75.

Pepita.

Studenta Esperanto-Societo dum
la aŭtuno 1972 aranĝis malgrandan
kurson por komencantoj, dissen-
dis inter la sciencistoj ĉe la
Universitato enketon pri la lin-
gvaj problemoj kaj kunlaboris
pri seminario pri interlingvist-
iko ĉe la Universitato. Ĝenera-
la kunveno okazis la 19an de Ja-
nuaro. La nova estraro konsistas
el prez.: Arne W. Aasland, vic-